


LA JUNA VIVO

MONATA ORGANO
POR LA

JUNULARO KAJ
KOMENCANTOJ



Redakcio kaj Administrado:
West-Graŭtdijk (N.H.)
Nederlando.
Gironumero 209354 Nederlando.
Tel. 10

Jarabono:
Nederlando: 0.75 guldeno
Aliaj landoj: 1 guldeno
(1 gld. = 2,1 Sv. fr. aŭ 10 fr. fr.)

Por progresintoj


CHARLES DICKENS.

Charles Dickens estis anglo. Li naskiĝis la 7an de Februaro, 1812, en Portsea. La malgranda Charles loĝis tie ĝis sia kvina jaro, kiam lia patro transloĝiĝis al Chattam apud Londono. Li estis en tiu tempo stranga knabeto. Malforta kaj malsanema li estis, kaj malofte li ludis kun aliaj knaboj. Nur legadon li tre ŝatis. Tiun legemon li dankis al sia patrino. La libroj, kiujn Dickens legis, estis: Robinson Kruso, Don Kihoto, k.t.p. Poste li rakontis, ke li mem estis tiuj „herooj”. Tio estas: dum semajno aŭ eĉ pli longe li imagis esti la ĉefpersono el la libroj.

Pro tiu meditado kaj fantaziado Dickens mem ekverkis dramon, kiun ili ludis en la familia rondo. Ankaŭ rakontojn kaj poemetojn li faris, kiujn li devis deklami starante sur tablo.

En la jaro 1821 la familio Dickens transloĝiĝis al la urbo Londono. Ne estis agrabla vojaĝo de la arbaroj kaj kampoj al la fumulplena, malpura Londono. Charles vojaĝis sola per poŝtveturilo, enpakita en pajlofasko, kun la surskribo: „afrankite alporti al la adreso”, kiel ĉasaĵo, kiun oni sendas ien.

Ankaŭ la vivo en la granda urbo ne estis agrabla. La patro de Charles perdis grandajn monsumojn. Pro tio li devis esti ŝparema kaj ekloĝi en kvartalaĉo. Ho ve, la ŝuldoj ĉiam kreskis kaj je iu malfeliĉa tago patro Dickens venis en la malliberejon. (Ekzistis en Anglio la kutimo, ke ŝuldanton oni povis malliberigi. Tiaj malliberuloj ĝuis tamen inter la muroj de la malliberejo sufiĉe da libero. Ili havis propran ĉambron, povis akcepti vizitantojn, eĉ ilia familio povis loĝi kun ili kaj libere en — kaj eliri).



Kiam patro Dickens estis mallibera, ĉiuj fontoj de enspezoj sekiĝis. Iom post iom la meblaro vendiĝis; unue la karaj libroj de Charles malaperis. Nun la dekjara knabeto devis perlabori sian propran panon. James Lamert, iu kuzo, kiu pli frue loĝis kun la familio Dickens, kaj nun posedis malgrandan fabrikon por ciro, dungis la knabon.

Por proksimume 3½ guldenoj Charles devis tutan semajnon fari unutonon, enuigan laboron. Sed liaj gepatroj, ĝojantaj ke la knabo iom enspezos, volonte konsentis. Pri sia laboro Charles Dickens mem poste rakontis jenon:

„La ciromagazeno staris ĉe la maldekstra flanko de la vojo. Ĝi estis malnova, kaduka domo, staranta apud la rivero kaj laŭvorte inundata de ratoj. Ankoraŭ mi vidas ilin, tiujn malnovajn ĉambrojn kun siaj lignaj vandoj, la putrajn plankojn kaj la vermtruitan ŝtuparon, kie daŭre la grizaj ratoj transkuris. Dum kiam mi skribas ĉi tion, mi ree aŭdas ilian pepadon kaj susuradon, ree mi flaras la mucidan haladzon de malzorgado kaj ruiniĝo. La kontoro estis en la unua etaĝo kaj rigardis kompreneble al la rivero kaj la karboŝipoj. Estis en ĝi malgranda ejo, kie mi devis sidi por fari mian laboron. Sur la potetojn kun ciro mi devis meti unue olean kaj sur ĝin bluan paperon, ligi ambaŭ per ŝnureto, kaj poste ĉirkaŭ-

tondi la paperojn, ĝis kiam ĝi aspektis kiel poteto kun ŝmiraĵo el la apoteko. Kiam certa kvanto da potetoj estis en tiu ĉi perfekta stato, mi sur ĉiun devis glui presitan etiketon kaj tiam komenci pri novaj potetoj.”

Estis malfeliĉa tempo por nia Charles. Malespera li ĉiufoje iĝis, kiam li ekpensis, ke li neniom plu lernas kaj forgesas ĉiom pli frue lernitan. La knabon oni tute malzorgis kaj lasis agi laŭplaĉe. Malbone vestita kaj malsata li vagis post la laborhoroj tra la Londonaj stratoj. Lia plej bona tago estis la sabato; tiam Charles ricevis sian semajnan salajreton kaj amuzis sin rigardi antaŭ ĉiuj butikoj, kion li povus aĉeti per sia „kapitalo.” La dimanĉojn Charles pasigis ĉe sia familio en la malliberejo. Lunde ree komenciĝis longa labor-semajno kun multaj zorgoj por vivteni sin.

„Mi estis tiel juna kaj infana, kaj ĉu povis esti alie, tiel malmulte kapabla zorgi pri mi mem”, Dickens poste rakontis, „ke ofte matene irante al la kontoro, mi ne povis kontraŭstari la tenton aĉeti malfreŝajn tortetojn, kiujn iu kukisto elmontris por la duona prezo. Kaj mi pagis ilin per la mono, destinita por mia tagmanĝo. Tiun tagon mi ne tagmanĝis, aŭ mi aĉetis bulkon aŭ pecon da pudingo. Ankoraŭ mi memoras, ke estis du pudingo-butikoj sur mia vojo, inter kiuj mi elektis, laŭ miaj financoj. En unu butiko oni ricevis pudington kun konfitaĵo, sufiĉe bongusta, sed multekosta; ĉar por 10 cendoj oni ricevis ne pli ol por 5 cendoj ĉe la alia. Tie ili vendis nutran, malsekan bakaĵon, kun tutaj sekvinberoj, kiuj sidis tamen tre disaj. Ĉirkaŭ la dekdna oni alportis la varman pudington supren kaj ofte ĝi servis al mi kiel tagmanĝo.

Mi scias, ke mi faris mian eblon vivi per mia mono. Mi dividis ĝin en ses egalajn partojn, ĉiun en aparta papereto, kaj metis ilin en tirkeston, kiun mi uzis en la kontoro; tiel mi klopodis vivi per ĝi dum la tuta semajno! Mi scias ankoraŭ, ke mi vagis tra la stratoj, malsata kaj malbone vestita!”

En la ciromagazeno li suferis foje atakon de sia junaĝa malsano: konvulsioj. Pri ĉi tio li rakontas jenan: „Bob Fogin, ankaŭ knabo kiu laboris en la magazeno, estis tre bona por mi, kiam foje min atakis mia iama malsano. Ĉifoje mi havis tiom terurajn dolorojn, ke oni faris por mi provizoran liton el pajlo en mia malnova ejo en la kantoro. Mi ruliĝis trans la planko pro la doloroj kaj Bob plenigis cirobotelojn per varmega akvo; li metis ilin ĉe mian flankon kaj senĉese donis novajn, dum la tuta tago. Ĉirkaŭ la

vespero multe, fakte tute pliboniĝis, sed Bob (multe pli forta kaj pli aĝa ol mi), ne volis konsenti, ke mi sola iros hejmen, kaj li decidis akompani min. Mi estis tro fiera por lasi lin kuniri al la malliberejo, tial mi klopodis diversmaniere liberiĝi de li. Sed la bonkora Bob ne volis aŭdi pri tio. Tial mi adiaŭis lin sur la ŝtuparo de iu domo, pretekste ke mi loĝas en ĝi. Por igi la aferon pli kredinda, se li postenrigardus, mi sonorigis, kaj mi memoras, ke mi demandis al la servistino, kiu malfermis, ĉu tie loĝas sinjoro Bob Fogin!"

Se vi proksimume volas scii, kiel Charles vivis, do legu „David Copperfield”. En ĉi-libro li rakontas preskaŭ sian propran historion, la personoj nur havas aliajn nomojn.

Dekkvinjara li venis kiel skribisto en la kontoro de iu prokuroro. En diversaj el liaj postaj romanoj estas partoj, ĉerpitaj el ĉi tiu kontorvivo. Cetere, de nun li notis ĉiujn travivaĵojn, kvankam Dickens ankoraŭ ne komencis verki. Krome li de nun regule vizitis la legejon en la Brita Muzeo. En 1831, kiam li estis 19-jara, Dickens fariĝis stenografisto ĉe iu ĵurnalo.

La vivo de ĵurnalisto estis tiutempe alia ol nun. Telefono, telegrafo kaj aŭtomobiloj ne ekzistis, sed tamen la abonantoj deziris la lastajn novaĵojn. Dickens rakontas pri tio: „Certe sesfoje mi pagigis de miaj ĉefoj rompiĝintajn veturilojn. Mi pagigis de ili surtuton, kiu difektiĝis pro la degutanta sebo de kandelo, ĉe kies lumo mi skribis meznokte en rapidveturanta kaleŝo. Mi prezentis fakturojn pro ĉiaj akcidentoj, kvindek dum unu vojaĝo, sen ke ili faris al mi riproĉojn. Ili ja sciis, kiom ni devis rapidegi. Mi prezentis fakturojn pri perditaj ĉapeloj, perditaj ekipaĵo — pri ĉio, nur ne pri perditaj kapo, tion ili ne pagus.”

Dickens verkis ne nur por la gazeto, ankaŭ en monata revuo aperis lia unua novelo. Baldaŭ pliaj sekvis kaj Dickens akiris iom da konateco. Jen komenciĝis lia famo. La verkisto ekzigis kiel stenografisto kaj verkis sian unuan romanon: „Postlasitaj paperoj de la Pickwik-klubo.” Baldaŭ sekvis aliaj noveloj en diversaj revuoj, kaj kelkaj komedietoj de li estis kun sukceso prezentataj .

Charles Dickens nun estis konata verkisto, ŝatata de ĉiuj angloj, kiuj opiniis kaj ankoraŭ opinias lin unu el siaj plej grandaj verkistoj.

El „Zonneschijn”.

trad.: VANE.

Subtenu La Junularlaboron, mendu viajn librojn ĉe le redakcio de „La Juna Vivo"! (Petu senpagan libro-liston!!)

25 GULD. POR UNU VORTO DE DICKENS.

Charles Dickens certe neniam dum sia vivo revis, ke oni iam „per oro” pagos liajn verkojn. Por li, la eta skribisto en la advokato-oficejo, la vivo estis tre amara antaŭ ol venis la sukceso pro la „Pickwick Papers”. Ankaŭ kiel raportisto pri juĝaj aferoj kaj kiel loka informisto ĉe Londonaj ĵurnaloj li nemulte laborgajnis. Poste tamen, kiam li fariĝis fama kaj faris sennombrajn rondvojaĝojn tra Anglujo por laŭtlegi el siaj propraj verkoj, li riĉiĝis. Kaj kiam li en 1870 mortis, li povis lasi al siaj infanoj grandan kapitalon, kiu ankoraŭ daŭre kreskis pro la ampleksaj eldonkvantoj de liaj verkoj.

Ankoraŭ ion Charles Dickens lasis al siaj parencoj. Li estis verkinta por siaj infanoj „La Vivo de nia Sinjoro Jesuo”, kiun verkon li finis en la jaro 1849, kaj kies manuskripto laŭtestamente estis destinita speciale por liaj infanoj.

En Marto 1934 mortis lia filo, Sir Henry, kaj nun la manuskripto povis esti vendata. La „Daily Mail” aĉetis ĝin por la grandioza sumo de 363.330 guldenoj. Ĉar la manuskripto enhavas 14.000 vortojn, oni do pagis por ĉiu vorto 25—26 guldenojn. Tio certe estas la plej alta prezo, kiun ĵurnalo pagis por la publikig-raĵto de tia manuskripto.

S-ro Butler sukcesis esperante traduki la libron tiel simpla, ke ĝi estas legebla por ĉiu komencanto. La bildoj estas belegaj, la papero artpresa. La prezo estas 2,40 gld.

La libro estas mendebla ĉe la redakcio de „La Juna Vivo”.

TUTMONDA JUNULARA KONGRESO.

La 29.II. kaj 1.III. okazis en Bruselo Internacia konferenco, de la junularo por la paco, kie estis reprezentataj 12 milionoj da junuloj el 23 landoj. Francaj kaj belgaj Esperantistoj proponis al la konferenco jenan rezolucion: Ĝi kore invitas la en la konferenco kunigitajn asociojn organizi por siaj anoj esperanto-kursojn, kaj decidas, ke Esperanto estos uzata kune kun la aliaj naciaj lingvoj kaj kiel sola traduklingvo en la kunvenoj de la junularo, organizotaj de la konferenco. La konferenco ne havis la tempon, voĉdoni pri tiu rezolucio, sed oni ripetos ĝin dum la Tutmonda Junulara Kongreso, kiu okazos de la 31.VIII. ĝis la 7.IX en Genève (adr: 14, av. de France), kaj estos organizata de Prof. Th. Ruysen. La Esperantistoj subtenu la klopodojn de la samideanoj francaj kaj belgaj, sendante gazetojn kaj leterojn al la organizonto kaj petante uzadon de Esperanto.

ENTERIGO DE PATRINO.

Sur tombeja kapeleto staras sonorigisto kaj rigardas en la direkto, kie ŝoseo suprenzonas la proksiman monteton. Ekvidinte etan vicon da homoj kun ĉerko, li komencas sonorigi. Pro la forte varmigita aero la sonorilo sonas sufokiĝinte. Ordinare aŭdata malproksimen, nun ĝia sonorado rebatiĝas kvazaŭ per muro. Sed kiom nun helpus la plena voĉo de l' sonorilo? Ĉu ĝi pligrandigus la areton da ĉerko-kondukantoj? Kiuj aŭdu ĝian sonoradon, tiuj ĝin aŭdas; kaj tiuj aŭdantoj, al kiuj la sonorado eĉ post forsono restos en la oreloj, estas nur sola ok-jara knabineto.

En kapeleto ŝi ekstaras apud la simpla, nigra ĉerko kaj petas la portantojn lastan fojon montri al ŝi la patrinon. Kiu do estus tiel malkompatema rifuzi al infano tian peton? Oni demetas la kovrilon de l' ĉerko. Iu levas la malgrandulinon sur brakon, por ke ŝi pli bone povu rigardi al la patrino. — Jen, tie ŝi kuŝas nun kviete, la sola, plej kara juvelo por infano en tutmondo! Ankoraŭfoje la infano karesas la malvarmajn vangojn de l' patrino, ankoraŭfoje ŝi klinas sian buŝeton al la malfermita buŝo de l' patrino, kiu nun jam neniam plu vokos la nomon de sia infano. — Kaj poste la orfeto sekvas la malkovritan ĉerkon, preninte el ĝi, kiel solan memoraĵon pri la patrino, ŝian lastfoje viditan vizaĝon.

Per strangaj, rigidaj okuloj la knabineto rigardas, kiel la tombo pleniĝas per sablo, oni aŭdas nek ploron, nek ĝemon el ŝia buŝo. Brunaj okuloj, kvazaŭ mirigitaj, kvazaŭ ektimigitaj rigardas al la fosantoj, kiuj jam plenŝutis la tombon.

Poste, pli poste, kara infaneto, vi plene eksentos kion oni enfosis de vi ĉi tie. — Poste, pli poste, vi eksentos, ke via suneto subiris ĉi tie, kaj tiam vi plorante ekĝemos,

Mortis mia patrineto,
Kiu levis min en sun'

APIŜU IEHKABS

Siberio. (El la latva M.P.)

Al la nederlandaj abonantoj, kiuj ankoraŭ ne pagis la abonkotizon por la jaro Julio '36—Julio '37, ni afable petas baldaŭ ĝiri f 0,75. Tiel vi ŝparas al vi kvitanckoston kaj al ni multe da laboro.

ENIGMOJ.

1	2	3	a, a, d, d, e, g, l, l, n, n, o, o, o, o, o, r, r, s, s, z, z.
1	g l a s o	z d	
2	a z e n o		
3	s n r		
3	o d o r o		

Riga, Latvolando.

1	2	3	b, b, c, c, e, e, l, o, o, o, o, o, o, r, k, t, t. La vortoj signifas, horizontale kaj vertikale:
1	c i t r o		
2	t e o		
3	o r o c o		
	o		
		o	

B. REICHBERG.

LA SOLVOJ EL NO. 10—11 KAJ 9.

				l						
				s	e	d				
			k	a	p	r	o			
		c	i	k	o	n	i	o		
	E	s	p	e	r	a	n	t	o	
a	r	i	s	t	o	k	r	a	t	o

						a			
				e	b	e			
		a	c	e	r	o			
	a	m	u	l	e	t	o		
m	a	n	d	o	l	i	n	o	

Premion gajnis: S.ro Brown, Londono, Anglujo; S.ro H. Koike, Nagano, Japanujo; S.ro de Jong, Amsterdamo, Nederlando, F.ino Paré, Lyon, Francujo.

Premion pro sendita verkaĵo ricevis: S.ro J. Krolski, Barlin, Francujo; S. Koöl, West-Grafdijk, Nederlando.

				d					
				t	r	i			
			l	e	o	n	o		
		f	r	o	m	a	ĝ	o	
d	r	o	m	e	d	a	r	o	
	b	a	n	d	i	t	o		
		k	n	a	b	o			
			p	r	i				
				o					

La gajnintoj estas: S.ro Heihači Koike, Nagano, Japanujo; S.ro H. Grosser, Berlin-Neukölln, Germanujo; S.ro Fr. Schmied, Mautern, Aŭstrio.

Premiojn pro verkaĵoj ni sendis al: S.ro J. Meester, Stomporetoren, Nederlando; S.ro Pari, Romo, Italujo; F.ino Chauveau, Chateauroux, Francujo.

La dua jarkolekto, bindita en bela kovrilo estas mendebla ĉe la redakcio. Prezo 0,80 guld., por abonantoj 0,65 guld.

Por komencantoj.

ORA HERBEJO.



Kiam maturiĝis la semo de la leontodoj, mi havis kun mia frato konstantan amuzon.

Ni iras ien; li antaŭe, mi tuj post lia dorso. „Sergo!” mi ekvokas seriozvoĉe. Li turnas sin, sed mi blovas ĝuste en lian vizaĝon leontodo-lanugojn. Li nun komencas gardi sin kaj apenaŭ mi ekoscedas, kiam li tuj blovas en mian vizaĝon. Kaj tiel ni deŝiris tiujn neinteresaĵajn florojn por amuzo.

Sed foje mi sukcesis fari eltrovon. Mi loĝis en vilaĝo. Antaŭ nia fenestro estis herbejo, tute ora pro multego da florantaj leontodoj. Tio estis tre bela. Ĉiuj homoj diris: „Kia bela, ora herbejo!” — Foje mi leviĝis frue por fiŝkapti, kaj rimarkis, ke la herbejo ne estas ora, sed verda. Kiam mi do ĉirkaŭ tagmezo revenis hejmen, la herbejo denove estis ora. Mi komencis observi. Je vesperiĝo la herbejo ree verdiĝis. Matene, kiam la suno leviĝis, mi vidis, ke la leontodoj malfermas siajn petaletojn, kaj pro tio la herbejo denove fariĝis ora.

De tiu momento la leontodoj fariĝis por ni la plej interesaj floroj, ĉar ili kune kun ni, infanoj, endormiĝis kaj kune kun ni leviĝis.

Siberio. (Elrusigis: M.P.).


MĤAEL PRIŠVIN.

LUDO.

Oni sidas en malgranda rondo. Unu el la ludantoj ĵetas pilkon al alia, dirante la nomon de unu el la tri elementoj: akvo, tero kaj aero. Tiu, kiu kaptas la pilkon, devas diri la nomon de besto, vivanta en tiu elemento. Oni diras ekz. „aero”, kaj la alia respondas

per: pasero, hirundo, cikonio, korniko, aŭ alia nomo. Se li ne tuj scias konvenan nomon, aŭ eraras, (ekz. diras, ke haringo vivas en la aero) li ricevas poenton. Kiu ricevas la plej malmultajn poentojn estas la gajnanto.

DUM ĈASADO.



Iufoje mi ĉasis kun kamarado tetrojn. Ni trovis tutan familion. Forkuris la tetropatrino, mi ekpafis kaj trafis. Tamen ŝi ne falis, sed forflugis kun sia idaro. Mi volis tuj postkuri ilin, sed mia kamarado diris: „Pli bone ni kaŝu nin ĉi tie kaj logu ilin returne!” Li povis ĝuste imiti la tetro-voĉon kaj efektive baldaŭ respondis unu el la idaro, poste ankoraŭ unu kaj subite — mi aŭdas, ke la tetropatrino mem komencas voki, tiel milde, afable, kaj tute proksime de ni. Mi levas la kapon kaj vidas: inter herbotrunketoj ŝi ĝuste kuras al ni, rapide, rapide. Sed ŝia tuta brusteto sangas; la amo en la koro de patrino estas pli forta ol doloro. Mi ne povas esti tia malbonulo..... Mi rapide ekstaras kaj ekfrapas per la manplatoj. La tetropatrino tuj forflugas kaj la junidoj momente silentiĝas. Mia kamarado multege koleris, insultante min kiel naivan malsaĝulon..... Vi fuŝis la ĉasadon!

Sed por mi fariĝis de tiu tempo pli kaj pli malfacile mortigi kaj elverŝi sangon.

Siberio.

El la latva tradukis: M. P.
TURGENJEV, RUSA VERKISTO.

- I. Legu kelkfoje „Ora Herbejo” kaj „Dum Ĉasado” kaj rakontu la enhavon per viaj propraj vortoj.
- II. Traduku kaj lernu parkere jenajn proverbojn:
Restu, tajloro, ĉe via laboro. — Antaŭe intencu, poste komencu. — Laboro fortigas, ripozo putrigas. — Aliaj cirkonstancoj, aliaj rimedoj. — De malgranda kandelo forbrulis granda kastelo.
- III. Faru verkaĵon laŭ unu el jenaj temoj: En la aeron. — Kiam ni transloĝiĝis. — La ekzameno. — En la farmdomo. — Mia ferio.

Sendu viajn verkaĵojn antaŭ 1 Septembro al red. „La Juna Vivo”. Inter la sendintoj ni dislotos 2 premiojn.

LA DEK UNUA LECIONO.

A. Super-flua peno.

Ekzistas maldiligentaj homoj kaj tre maldiligentaj homoj. Al la lasta grupo apartenis S.ro P. Li loĝis en **kamp-dometo** kun granda truo en la tegmento. Iam amiko **vizitis** lin, kaj demandis: „Sed **kara** amiko, kial vi ne ŝtopas tiun truon?” S.ro P. **oscedis**, rigardis al la suno kaj diris: „Mm, **kiam pluvas** oni ne povas ripari la tegmenton, kaj kiam estas bela vetero, nu, tiam ne bezonas.”

ne neces.

B. Unua strat-bubo: Ĉu vi komprenas nian instruiston? **Hieraŭ** li diris, ke 5 kaj 4 estas 9, kaj **hodiaŭ** li diris, ke 6 kaj 3 estas 9. Dua stratbubo: Jes, kio nun estas **vera**?

C. Li vizitas la patron — Li vizitas lin. Mi manĝas panon — Mi manĝas tion. Li skribas leteron — Li skribas tion. Kion mi manĝas? — Mi manĝas panon. Kion li skribas? — Li skribas leteron. Mi manĝas bonan panon. Li skribis longan leteron.

D. Instrui — instruisto, butikoj — butikisto, dento — dentisto, haki — hakisto, horloĝo — horloĝisto, kanti — kantisto, komerci — komercisto, kuiraj — kuiristo, legomo — legomisto, meblo — meblisto, okulo — okulisto, pordo — pordisto, skribi — skribisto, ŝuo — ŝuisto, tondi — tondisto, vojaĝi — vojaĝisto.

- I. Lernu bone la novajn vortojn en A, B, C, D.
- II. Kopiu A, B, C, D en vian kajeron.
- III. Traduku A, B, C, D en vian gepatran lingvon.
- IV. Lernu parkere B.
- V. Respondu al jenaj demandoj:

Kiaj homoj estas en la mondo? Kiu apartenis al la lasta grupo? En kio loĝis S.ro P.? Kio estis en la tegmento? Ĉu en la tegmento estis trueto? Kiu vizitis S.ron P.? Ĉu la amiko ŝtopis la truon? Kion li diris? Kion faris S.ro P.? Kion li respondis?

Ni afable petas niajn eksterlandajn abonantojn, ke ili baldaŭ pagu la abonkotizon. „Vidu paĝon” 16.

LA DEK DUA LECIONO.

A. Komparo.

La instruisto diris al la infanoj: „Mi konsilas al vi, frue iri el la lito. Estis iam viro, kiu tre frue el-lit-igis (iris el la lito) por promeni, kaj li tiam trovis mon-ujon!”

„Nu,” diris unu el la knaboj, „sed la homo kiu perdis la monujon ellitiĝis ankoraŭ pli frue!”

B. Reklamo.

„Vidu,” diras reklam-agento al kliento, „oni ne povas komerci sen reklamo. Jen la anasoj! Ili produktas ovojn. Ankaŭ kokino produktas ovojn, sed ĝi sam-tempe laŭte kluhas. Tial la homoj manĝas kokin-ovojn, kaj ne anas-ovojn!”

C. La bela birdo — La birdo estas bela — La birdo kantas bele. Bona demando — Bone demandi; frua alveno — frue alveni; longa rakonto — longe rakonti; bona ekzercio — bone ekzerci.

I. Lerne bone la novajn vortojn en A, B, C.

II. Kopiu A, B, C en vian kajeron.

III. Traduku A, B, C en vian gepatran lingvon.

IV. Lerne parkere B.

V. Respondu al jenaj demandoj:

Kion diris la instruisto? Kiu konsilis al la infanoj frue ellitiĝi? Al kiuj parolis la instruisto? Kion li rakontis? Kiu trovis monujon? Ĉu la instruisto trovis monujon? Kiam promenis la viro? Kie instruis la instruisto? Kiujn instruis la instruisto? Kion respondis unu el la knaboj? Kiu pli frue ellitiĝis? Ĉu la knabo bone respondis?

Por ekzerci la finaĵon „n”, ni konsilas multfoje ludi jenan ludon:

Mi vidas ion, kion vi ne vidas.

Karlo: Mi vidas ion, kion vi ne vidas. Ĝi estas ruĝa (dika, mal-dika, granda, ronda, kvarangula. ovala ktp.).

Petro: La bluzo? — *Karlo:* Ne.

Leno: La floroj en la vazo? — *Karlo:* Ne.

Adolfo: La beroj, la kraĵono, la pomoj? — *Karlo:* Ne.

Petro: La robo? — *Karlo:* Jes!

Petro: Mi vidas ion, kion vi ne vidas. Ĝi estas verda. (k.t.p.).



9-13 jaraj infanoj el West-Graffdyk, kiuj ludis la teatraĵon „La Novaj Vestoj de la Reĝo” („La Juna Vivo” No. 6-29)

KOMUNIKOJ PRI LA GAZETO.

Esperantistaj grupoj en jenaj lokoj enkondukis „La Juna Vivo”: Casticum (Ned), Kwadijk (Ned), Koedijk (Ned), Nieuwendam (Ned), Sliedrecht (Ned), Uitgeest (Ned), Ede (Ned).

Se ankaŭ en aliaj grupoj oni prezentis teatraĵon el „L. J. V.” ni volonte sciigos pri tio!

Senpagaj prospektoj: 1. *Gvidlibro pri Callantssoog kun Esperantolingva parto.* — Ilustrita gvidlibro pri la ned. banloko Callantssoog, ĉe la Norda Maro. Adr.: V.V.V., Callantssoog, Nederlando.

2. *Esperanto-lingva turisma prospekto pri Bern.* La „Trafika Kontoro de la urbo Bern” (Svisujo) eld. il. fald-prospekton pri la svisa ĉefurbo kun listo de la hoteloj. Adr: Oficiala Trafika Kontoro, Bundesgasse 18, Bern.

3. *La Lyona Internacia Foiro kaj libro Lyon* kun 50 bildoj. Adr: Foiro de Lyon, Esp. Fako, Rue Menestrier, Lyon, Francujo.

4. *Budapest*, la metropolo de sanigbanejo. Adr: Centra Komitato de Banejo, Budapest, V. Vigado-Plazo 3, Hungarujo.

5. *Gvidfolio por vojaĝantoj en Manĉurio.* Adr: Sud Manĉuria Fervoja Ko (S.M.R.), Dairen, Sud- Manĉurio.

6. *Pärnu, la plej bela banurbo en Estonio.* Adr: Baninspektoro — Pärnu — Estonio.

GRAVA SUKCESO DE ESPERANTO EN NEDERLANDO.

La A.N.V.V. (Unuiĝo por fremdultrafiko en Nederlando) ĵus eldonis beleĝan broŝuron pri Nederlando, pri ĝia turisma valoro, ĝia arto, ĝiaj belaj urboj, akvoj kaj vojoj.

La broŝuro estas belega rilate al fotoj, presoj kaj aspektoj. Vi ricevos ĝin senpage je simpla peto, do esperantistoj, grandnombre petu ĝin. La adreso estas: A.N.V.V., Esperanta Sekcio, Lange Voorhout 102, 's Gravenhage.

RICEVITAJ ESPERANTAJOJ.

Ni atentigas eldonantojn de libroj ke „La Juna Vivo” estas gazeto por la junularo kaj sekve recenzas nur tiujn librojn, kiuj estas interesaj por la junularo. Aliajn verkojn ni nur mencias.

Adresaro de Polandaj Esperantistoj, 40 paĝa. Adr: Varsovio, al. Jeruzolimskie 101, Polujo.

Ĉu ĝi estas nur fabelo? Verkis Jan Wolski. Trad. Kpt. Roman Dabrowski. Adr: Al. Jeruzolimskie 101, Varsovio. 157 paĝoj; formato 19,5 x 14 cm. Prezo 1,50 gld. (Ilustr. junular-romano).

Esperanto Kantoj (originalaj kaj tradukitaj) — de H. E. Jensen, Byskolen, Toustrup, Danujo.

Norvega Kantareto. Kompilis Liv. Sandberg. Eld. Norvega Esp. Ligo, Oslo. 40 paĝa.

Hindo rigardas Svedlandon. (L. Sinha). Eld. Sved. Esp. Federacio, Stokholm. 200 paĝa, prezo: broŝ. 1,5 gld.; bind. 2 gld. — La interesan kaj tre riĉan libron plibeligas ne malpli ol 128 bildoj. — La libro de Sinha sendube kaptos la intereson de la esperantistoj en ĉiuj landoj. Estas maloftaĵo ke orientano tiel serioze studas la naturon kaj kulturan vivon de okcidenta lando, ke li poste kapablas verki riĉenhavan libron pri la temo, kaj en la historio de la esperanta literaturo tio estas ĝis nun unikaĵo.

Ilustrita lernolibro de Esperanto por praktika komenca kurso. (Delfi Dalman). Apartado 5081, Barcelona. Prezo 0,40 gld.

Kongreslibro. — Ned. Esp. Kongreso dum Pentekosto '36 — Leeuwarden. 44 paĝa, belaspekta. Adr: F.ino Laverman, Molenpad 69, Leeuwarden

Jarlibro Sveda Esp. Federacio. 72 paĝa, tre bela papero.

Een verzameling Esp. spreekwoorden en Zegswijzen, door M. de Waard. Eld. W. J. Thieme & Cie, Zutphen. Prezo: 0,90 gld.

Kanto al mia koro (Tadijanoviĉ) Poemoj. El la kroata originalo tradukis J. Velebit, 66 paĝoj. Formato 15 x 19 cm. Eldonis la tradukinto S.ro J. Velebit, Zagreb, Jugoslavio.

Ĉiu, kiu varbas 5 abonantojn, sciigu al ni, ĉu li (ŝi) deziras donace ricevi la unuan aŭ duan bind. ĵarkolekton.

JARKOTIZO:

Ameriko: 0,70 dol.; **Aŭstrio:** 3,20 ŝil.
Britujo: 3 ŝil.; **Belgujo:** 17 fr. fr.;
Bulgarujo: 50 lev.; **Ĉeĥoslovakujo:** 16,50 Kĉs.;
Danujo: 3 kr.; **Estonio:** 2,50 est. kr.;
Finnlando: 30 finn. mk.; **Francujo:** 10 fr. fr.;
Germanujo: 2 M.; **Hispanujo:** 5 pes.; **Italujo:** 8,3 ital. lir.;
Japanujo: 2,50 jap. jen.; **Jugoslavio:** 30 din.;
Latvio: 2,1 l.; **Norvegujo:** 2,7 kr.;
Polujo: 3,6 zl.; **Portugalujo:** 15 port. esk.;
Svedujo: 2,70 kr.; **Svisujo:** 2,1 sv. fr.

KURSGVIDANTOJ!!!!

Vi deziras por viaj lernantoj malkarajn praktikajn esp. lego- kaj lerno-librojn?

Mendu tuj la unuan kaj duan binditajn jarkolektojn de „La Juna Vivo”, (200-paĝaj libroj en artaj kovriloj). La prezo estas nur 1,6 Sv.fr. = 0,75 guld.

Abonantoj ricevas rabaton.

Geedziĝis:

H. A. LEYDEN (Sved.)

kaj

C. M. MOLENAAR (Ned.)

Estonta adreso:

Box 590, Höör, Svedujo.

Geedziĝis:

JOHANO MARTINEZ

(Hisp.)

kaj

MARINA TROMPER

(Ned.)

Adr:

Vilao „Niastel”, Solliès-Pont
(Var) Francujo.

BONVOLU SENDI LA MONON POR „LA JUNA VIVO”:

Aŭstrio: S.ro Scheibenreiter, Hermannsgasse 31/26, Wien VII.

Belgujo: Hendrik Rainson, Mechelen, Belga ĝironumero 335183.

Britujo: The British Esp. Asocio, Inc. 142 High Holborn, London W.C.I.

Ĉeĥoslovakujo: L. J. Svoboda, Plzen „U Zvonu”, ĝironumero 14171 Praha.

Ĉeĥoslovakujo: Esperanto Asocio, Praha XIX, Uralské nám. 447. Poŝtĉekkonto 12.371.

Danujo: S.ino M. Jensen, Galtrup, Erslev, ĝironumero 44593.

Estonio: Esperanto-Asocio de Estonio, Tallin, Poŝtkast 6.

Finnlando: Esperanto-Instituto de Finnlando, Kluuvikatu 5, Helsinki.

Francujo: S.ro Matthieu, Dijon, 27, Place de la République, Côte d' Or.

Germanujo: Ewald Killmer, Schwabenweg 14, Wuppertal-Elberfeld. Germana ĝironumero: „Köln 104097”.

Japanujo: S.ro Joshy H. Ishiguro, Daita 2—784, Setagaja, Tokio. Poŝtĉekkonto: Tokio 62061.

Jugoslavio: Vilim Buk, Knjižgotiskara, Sl. Brod. Ĉeko Nro. 37.556.

Latvujo: Ludmila Jevsejeva, Riga, Reformiatoru, iela 14, dz. 5.

Norvegujo: Norvega Esp.-Ligo, p/a S.ro G. Johannessen, Skappelsgate 5, Hamar.

Polujo: Librejo-Eldonejo, Esp. Fako, S.ro N.Szapiro, Warszawa, Nowoliпки Nr. 8. Poŝtĉekkonto: Warszawa 16.562.

Svedujo: John Karlsson, Berga, Vasterhaninge. Sveda ĝironumero 72295.

Svisujo: S.ro R. A. Dasen, 19a Avenue Riant-Parc, Genève.

Usono: Amerika Esp.-Instituto, 1111 Brooke Road, Rockford, Illinois.